

KATOLIKA SENTO



SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV



KATOLIKA SENTO

BOLLETTINO DELLA
UNIONE ESPERANTISTI
CATTOLICI D'ITALIA
(U.E.C.I.)

Anno 50° - 1971

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (Mi)

Redattore:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

KATOLIKA SENTO

N-ro 3 - Marto 1971

50a Jaro

Ni ĝoje informas niajn membrojn pri omaĝo de UECI kaj IKUE al la papo, okaze de la 50-a datreveno de nia itala asocio, per la traduko de letero adresita de P. Ferd. Longoni al la papo.

"Sanktega Patra Moŝto,

La subskribinto en nome de la Italaj Katolikaj Esperantistoj kiel respektoplenan omaĝon prezentas al via Sankteco la unuan ĉijaran numeron de nia revuo, kiu eniras sian 50-an vivjaron. Ĝiaj unuaj paĝoj donas la tradukon de la paca mesaĝo, kiun Via Sankteco proklamis al la tuta mondo komence de la 1971-a jaro. De paĝo 12 ĝis la 23-a oni raportas pri via apostola vojaĝo al la Ekstrem-Orientaj landoj; oni akcentas ĝian misian valoron kaj oni resumas viajn paroladojn.

Antaŭ kelkaj tagoj alvenis al la subskribinto la oficiala informo de lia elekto kiel Prezidanto de la Tutmonda Asocio de la Katolikaj Esperantistoj: en ĉi tiu nova kvalito li prezentas al via Sankteca Moŝto la omaĝojn kaj la ateston pri fideleco de la katolikoj de la tuta mondo, kiuj uzas Esperanton por apostolaj, misiaj kaj ekumenaj celoj, por sociaj komunikoj, por karitata kunlaboro favore al subevoluintaj landoj, kaj en ĉi tiu epoko de peniga konfuzo de ideoj li rekonfirmas fidelecon si an kaj de la tuta organizo al li konfidita, por ĉiuj direktivoj, kiuj estas disdonataj de via alta Apostola Katedro.

La Esperantistoj ĉiam danke memorante, ke Via Sankteco permesis uzadon de Esperanto en la liturgio, nun

pere de mi ili kuraĝas peti de la afablo de Via Sankteco, tre valoran donacon.

Jen la donaco, kiun ni humile kuraĝas esperi: la paska saluto.

De multaj jaroj estas mirinda kaj konsola kutimode la suverenaj Pontifiko^j, ke en la paska tago la mesaĝo disdonita "Urbi-et-Orbi" finiĝu per ak^lam^oj, laŭ diversaj lingvoj, al la Reviviĝinta Kristo. Ni petas do, ke Via Sankteco bonvolu aldoni, por la esperanta lingvo: "Nia Savinto re^leviĝis. Laŭdu Dion!"

Ni ne kuraĝus tiom esperi, se ni ne konus la grandecon de la koro de Via Sankteco, kiu ampleksas la tutan homaron.

La Katolikaj Esperantistoj de la tuta mondo, esprimante ankoraŭfoje siajn filajn sentojn de fideleco al la Apostola Seĝo, levas al Dio preĝojn por la vivo kaj konsolo de Via Sankteco kaj petas la apostolan Benon.

El Limbiate, en la festo de Nia Sinjorino de Lurdo, la 11-an de februaro 1971-a

Don Ferdinando Longoni
Prezidanto de IKUE

KIEL LASTMOMENTE NI informis per aparta folio aldonita al nia bulteno, kuniĝis en Klagenfurt (Aŭstrujo) s-ro K. Dürschmid el la sama urbo, kaj s-ro F. Galbusera el Verono (Italujo), jam komisiitaj por tiu kontrolo en la IKUE-sembleo de julio 1970-a, por malfermi antaŭ la notaro la leterojn de la IKUE-anoj, ĝis ti^am alvenintajn, kun la voĉdonoj por elekto de la nova estraro. Kvankam ni ne ricevis oficialan komunikon, ni povas diri, ke pli ol 170 voĉdonoj alvenis el 18 landoj, kaj ke pli ol duono de ĉi tiuj kuniĝis en la elekto de sac. Ferdinando Longoni, kiel nova Prezidanto dum la

aliaj nomoj restis je granda distanco. S-ro J. Tuinder ĉesis tiel sian taskon, kaj li eĉ ne ricevis sufiĉajn voĉdonojn por restadi en la estraro. Nun komenciĝas nova grava epoko por rekonstruo de nia IKUE, kiu ricevis gravajn batojn en la lastpasinta tempo; kaj unu el la plej urĝaj problemoj estos la anstataŭado de la redaktoro, s-ro St. Maul.

Tuj post la anonco de ni donita alvenis al ni el diversaj landoj multaj gratuloj, eĉ de ne katolikoj, kiuj montras, kiel oni aprecas kaj amas IKUE-n, nian gloran katolikan Asocion, kaj ĝian revuon, la plejaĝan esperantistan periodaĵon.

Aparte la nova elekto, en la persono de nia UECI - ano sac. Ferdinando Longoni alportos fine sian bonfaran influon de klareco kaj malstreĉiĝo ankaŭ en nian UECI kiu tiom suferis, samkiel diversaj aliaj naciaj katolikaj esperantaj asocioj, pro la devojiĝoj, kiujn multaj kun konsterno rimarkadis ĉe nia patrino Asocio IKUE kaj pri kiuj oni multe, kvankam vane protestis.

Por diskuti la postsekvojn, kiuj rekte rilatas nian italan asocion, oni decidis, ke la UECI-kunveno okazos en Bologna, la 14-an de marto, dimanĉe, je la 10 h. ĉe "Istituto Antoniano" - via Guinizelli, 3. Antaŭ la kunveno oni celebros la meson en la preĝejo de la sama instituto.

Ĉi tiu anonco validas kiel persona invitilo por ĉiu UECI-
-ano itala aŭ eksterlandana. Tiuj, kiuj laŭregule pagis
la ĉijaran kotizon kaj opinios, ke ili ne povos partopre
ni en la kunveno, povos sendi leteron, esprimante siajn
sentojn kaj proponojn pri la movado en nia itala Asocio
al la UECI-prezidanto, P. Albino Ciccanti, Ofm., je la
supre dirita adreso de Bologna; aŭ oficigi pri tio per
skriba delego alian rajtigitan personon.

CENTRO ESPERANTISTA CATTOLICO ROMANO

N° 91

ALIĜIS AL UECI-CECR kun la bulteno: Romo: L. Macak; R. Clerici; Aosta: A. Cuaz; Bolonjo: C. Casagrande; G. Gimelli; Breda di Piave: Treviso: G. A. Merlo; Brescia: B. Marinaro; E. Bordogna; Chirignago (Venezio): G. Ferrarese; Florenco: C. Grazzini; Grosseto: M. Casoli; Mantova: D. Zacché; Massa: M. Dazzini; Messina: F. Minuccio; Napolo: E. Mingo; Rimini (Forlì): E. Magnani; Roccasecca (Frosinone) N. Vessella; Biella (Vercelli): C. Cerri; Aŭstrujo: F. Casar J. Nagy; Ĉeĥoslovakio: R. Kalina, O. Horakovà; K. Moravčíková; M. Olos; B. Suchanek; J. Sedlak; Francujo: M. Pierru; Germanujo: H. Zimmerer; Hispanujo: M. Romero G.; F. De la Puente; Hungarujo: L. Kobor I. Nagy; J. Balint, L. Borbély; Israelo: C. Cecchitelli Pollando: R. Rokicki; Sovetunio: M. Gyls; entute: 255.

PASTROJ, KIUJ INTENCAS ALIĜI, povas celebri unu meson intence de p. Jacobitti, nur avertante lin pri tio. Aliaj personoj, kiuj preferas tiun aliĝmanieron, povas peti la samon de katolika pastro - kiel supre dirite - sed estas petataj sendi al p. Jacobitti konfirmon, se eble, pri la celebr(i/o)ta meso, subskribita de la pastro. Tiuj, kiuj eĉ ne tiamaniere povas fari, kaj tamen ŝatas la bultenon, petu de p. Jacobitti ĝian senpagan sendadon.

DE CLUSONE (Bergamo) ni ricevis informon, ke en la porpastra seminario diversaj seminarianoj entuziasme lernas E-on sub gvidado de sac. Battista Cadei. Gra-

tulante la instruiston kaj la lernantojn, ni profitas la okazon, por montri ilin kiel ekzemplon, ĉar post la laŭdoj kaj kuraĝigoj de ĉiuj lastatempaj papoj, pri kio ni parolis en la propagandfolio "La Chiesa Cattolica e l'Esperanto", ĉiu vera katoliko, kaj eĉ pli, ĉiu pastro devus apreci kaj lerni Esperanton pro apostola sento.

BIBLIA REVUO, N° 4-a (oktobro-decembro 1970) aperas kun tre grava artikolo de la esperantista profesoro pri S. Skriboj, P. Siedl Suibert, el Salzburg, titolita: "Malnova kaj Nova Testamentoj- Pri diverseco kaj unueco de ambaŭ Testamentoj". (20-paĝa); interesaj ankaŭ la artikoloj: "Frukristana koncepto pri Seolo" kaj "Kursi" en la arkeologia sekcio. Krom elenko de artikoloj el diversaj revuoj, kaj recenzo de libroj, troviĝas ankaŭ interesaj informoj pri la Biblia Movado, el kiuj ni scias, ke la S. Seĝo donis lastatempe 25.000 us. dolarojn por la efektivigo de komunaj tradukoj de la Biblio fare de la Unuiĝintaj Bibliaj Societoj, (U.B.S.) reprezentantaj 49 naciajn asociojn. La prezidanto de la U.B.S. deklaris, ke en la 1975 estos preta - kun ladia helpo - la unua interkonfesia kritikeldono de la Malnova Testamento. La sama rubriko informas, ke la Katolika-Protestanta Komitato estas nun redaktanta la trian kritikeldonon en la originala lingvo, de la Nova Testamento, kio estos la bazo de la Novtestamentaj tradukoj en 110 modernajn lingvojn. La U.B.S. estas nun redaktanta tradukojn de la Sanktaj Skriboj en 610 modernajn lingvojn, dum la katolika eklezio kunlaboras en 110 tiuj projektoj. (Meze de 1969 la Amerika Biblia Societo anoncis la eldonadon kaj disdonadon de 1 miliono da ekzempleroj de la Sanktaj Skriboj). Sed por atingi la tutan homaron oni bezonas tradukojn de la Biblio en 2700 lingvoj aŭ dialektoj, kiuj hodiaŭ estas parolataj en la 5 kontinentoj de la mondo. Aliaj informoj rilatas monu-

mentojn al la Biblio en Brazilo, kaj esperigajn klopodojn por decifri per komputilo esoterajn skribaĵojn de la prahomoj de Hindus-valo, faritajn antaŭ 4 mil jaroj. Fine oni legas noton de prof. A. Duranti pri Terkultura Kalendaro de Gezer (datita de la 11-a jarcento a.K.) kaj tradukojn de kelkaj psalmoj laŭ prof. Broadribb.

RADIO ROMA - ESPERANTO. Marto 1971-a.

Dimanĉon la 7-an: Tra la literaturo; la 14-an: Novaĵoj el Italujo; la 21-an: Kantoj en Esperanto; la 28-an: Leterkesto. - La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto". La dissendoj okazas de h. 21.00 ĝis h. 21.20 (M.E.T.) Ondlongoj: m. 30,90 - 41,24 - 50,08.

.....
El Romo, centro de Katolika mondo, kelkajn informojn pri la vivo kaj agado de l' Eklezio:

.....

LA PAPA ADMONO "Quinque iam anni" (Jam kvin jaroj), datita la 8-an de decembro 1970, estis publikita la 5-an de januaro 1971. Ĝi estas adresata al la tutmonda episkoparo, je la 5-a datreveno de la finode la Dua Vatikana Koncilo. Sed ĉar ĝi estas dokumento de la plej alta paŝtisto de la eklezio, ĝi interesas la tutan dian popolon. Pro tio ni volas prezenti pri ĝi kelkajn pripensojn por montri ĝian spiriton kaj reliefigi ĝian nuntempecon.

Dominanta motivo de la "Quinque iam anni" estas invito reiri al la fontoj, al fideleco por la origino.

La papo, kvankam al li apartenas konfirmi la fratojn en la kredo, ne pozas kiel juĝisto de episkopoj, neniu li riproĉas. Li sin montras kiel fraton, kaj invitas ilin al konsciencexamenon pri la komuna tasko diskonigi la di

ajn verojn transdonitajn al ili de la apostoloj, kaj pri la komuna devo konservi puran kaj integran la revelaci aron. La ofico de la anonco de la evangelio, laŭ la duobla funkciado de proklamo kaj de prorektado antaŭiros ĉiujn aliajn episkopajn oficojn. Dum ĉi tiuj povas esti plenumitaj ankaŭ de aliaj personoj, la aŭtentika instruado estas ekskluziva de episkopo. Pro tio se li ne plenumas tiun devon, li ne efektivigas plene sian episkopecon. Kaj li estigas en la eklezio vakuan lokon, ĉar li ne povas transdoni al aliaj la prerogativojn, kiujn Dio donis al li.

La episkopa instrurajto atingas sian plej altan esprimon en la instruado fare de la roma pontifiko. Devenante de la plej alta instruanto de la eklezio, ĝi donas pli evidentan garantiaĵon, kelkfoje absolutan, pri ĝia konformo kun la dia revelo. Tamen al la unueco de esprimo ne respondas unueco de ekzisto kaj de ekzercado. Kiel tiu de la papo, estas esenca elemento de la eklezio ankaŭ la instrurajto de la aliaj episkopoj en jerarkia komuneco kun li.

La bonfarto de la eklezio postulas la unuecon de la instruado de ĉiuj membroj de la episkopa kolegio, kiu estas la viva daŭrigo de la apostola korpo. La eklezio estas vigle agitita per fermentoj, kiuj faras pli konvinka la kredon de multaj kaj pli sentebla ĝian ĉeeston kiel savsakramenton kaj renkontiĝejon de l'homaro. Sed ne mankas fermentoj, kiuj malpliigas ĝian kredeblecon, kiam ĉi tiuj manifestiĝas kiel teoriaj kaj praktikaj malkonsentoj kaj kreas alian alergion pri fundamentaj veroj.

Ĝuste tiam la instrurajto estas signo kaj perilo, kiupermesas agnoski la dian vorton. Ĉar tiam la episkopa vorto havas la signon de apostoleco. Ne nur ĉar ĝi devenas de la apostoloj, sed ĉar estas la apostoloj mem, kiuj daŭrigas la dian mesaĝon pere de la episkopoj, al ki

uj ili transdonis sian instrurajton. La episkopoj do de vas zorgi, ke la evangelia mesaĝo ne malaltiĝu laŭ ra cia nivelo. Ĝi estas mesaĝo pri fido, kiu konsistas en kredo al tio, kion oni ne vidas. Kaj ĉi tiu estas la kon diĉo de kristano: ke li marŝu laŭ la kredo, kiu estas super ĉiu homa saĝeco, ĉar ĝi baziĝas sur la dia po-
tenco, kiu agadas samtempe ĉe la anoncanto kaj ĉe la ricevanto.

Povas okazi, ke inter la anonco kaj la ricevo eniĝu mal-
facilaĵoj. Kiam ĉi tiuj estas lojalaj, ili povas esti uti laj al enprofundigo de la kredo pli ol ĝia pasiva rice-
vo. Apartenos al la episkopoj klarigi al la fideluloj, in-
kluzive teologoj, tion, kion Dio volas, ke ili kreu: tio
estas la vero en sia progresanta daŭro, kiu kunliĝas,
pere ankaŭ de historia retroiro, al la kristana mesa-
ĝo transdonita de la apostoloj. Ili estas rajtigitaj de
la Sankta Spirito, kiu volis, ke ili regu la dian ekle-
zion. Kaj neniam la Sankta Spirito povas iri kontraŭ
sin mem. Ĉar li estis donita ankaŭ al ĉiuj baptitoj, lia
dia agado konsistas en ilia deturno de personaj aŭ gru-
paj izoliĝoj, por enigi ilin kaj ĉiun en la universale-
con de la kredantaro, kio estas la eklezio, starigita de
Kristo sur la apostoloj kaj konstruita sur Petro, ilia
kapo.

Ke la evangelio estas tie kaj tie kripligita aŭ adulteri-
ta ne estas nura ebleco; ĝi estas ankaŭ fakto. En la
papa letero oni legas la konstaton dolorigan, sed sen
forsilentadoj. Silento vualas iom post iom kelkajn fun-
damentajn misterojn de kristanismo. Aro da ambigue-
coj, necertecoj, duboj malkvietigas la kredon pri tio,
kion ĝi havas plej esenca. La triunieca dogmo estas di
sneniĝinta: ne temas plu pri tri Personoj egalaj kaj
distinktaj, sed pri tri aspektoj de Dio kiakreinto, ela
ĉetanto kaj sanktiganto. Dispecigita estas la kristolo-

gia dogmo: kiu ne plu alcentriĝas en la kuniĝo de la dia al la homa naturo hipostate descendanta, sed en la ascendanta hipostata kuniĝo, per kiu en iu homo, kiu no miĝis Kristo, efektiviĝis la plena dia revelo. Estas se nigita je signifo la eŭkaristia dogmo: ĉefe laŭ la aspekto de reala ĉeesto de la Sinjoro, ne plu ligita al la substanca aliiĝo de pano kaj vino. Estas duonigita la ekleziologia dogmo: la eklezio estas pritaksata kiel komuno de savintoj, ne kiel institucio por savo, kiu pere de la sacerdota ofico kaj de la paŝtista gvidado, estas la necesa vojo por renkontigi homojn kun Dio. Estas sekularigita la instruo de la moralo, ĝis malsanktigo de la homa vivo ĉe la radiko; oni oponas al la ne solvebleco de edziĝo, al ĝia unua celo, kio estas vivgenerado, al malpermeso ne sufoki ĝin ĉe ĝia naskiĝo, al ĝia protekto kaj eduko dum ĝia evoluo. Kaj kaŭzo de ĉio ĉi tio, kvankam ne unika, estas la malpliigo de la dia inspiro en la Sankta Skribo, en nome de ĝisfunda malmitigokaj forprenante ĝian interpreton el la eklezio kiel lasta instanco. Tiel okazas, ke ĝuste startante de la Sankta Skribo oni masakras la kredon.

Malhelpi ĉi tiujn erarojn, kiuj estas renovigoj de malnovaj herezoj estas nek en la povo de episkopoj nek de la papo. Sed apartenas al ili denunci tiujn kiel erarojn. La fideleca servo, kiu apartenas al la episkopoj kuntrenas ankaŭ la dian popolon. Gi tion postulas kaj subtenas. La Sankta Spirito ne povas ĉeesti kie pro la fendita kredo ankaŭ la komuneca karitato suferas, kaj kie la eklezio ne povas esti kompakta. Kaj ĝi admonas, ke ĉiu ajn, kiu sin detenas de la episkopa komuneco, kaj pere de ĝi, de la kapo kaj de la aliaj membroj, tiu sin disigas ankaŭ de la vivanta korpo de l'eklezio.

"LA EKLEZIO ENKARNIĜAS EN la mondo" Pri ĉi tiu esprimo de Paŭlo VI en unu el liaj paroladoj dum la voja-

ĝo al Ekstrema Oriento, ni ricevis tiel belan komen -
 ton de iu pakistana misiisto, ke ni volas diskonigi ĉi ti
 on al nia legantaro, kiel valoran mediton. "Ni estis tra
 fitaj kaj kortuŝitaj - li skribis - de la profunda vero
 de tiu vorto. La eklezio enkarniĝas, tio estas fariĝas
 vivanta, ĉeestanta en homoj el ĉiu ajn klimato, kultu -
 ro kaj raso, ĉar la Dia Vorto, Jesuo, enkarniĝis, kaj
 fariĝinte homo, li fariĝis eklezio por ni. Li fariĝis sa
 cerdoto kaj viktimo, kaj, kiel viktimo li verŝis sian
 sangon, li mortis por nia savo. La eklezio en la mon
 do daŭrigas la vivon de Kristo. Ĝi oferas sin mem kun
 li kaj kun li ĝi verŝas sian sangon. La sango de mar
 tiroj atestas la vivon de la eklezio. Kaj kun la marti
 roj, la virgulinoj, kiuj konsumas sian vivon en preĝa
 do kaj en pentofaro; la kredkonfesantoj, kiuj atestas
 an kredon per la sankteco de sia vivo; la sacerdotoj,
 kiuj travivas sian pastran oficon kiel Jesuo, krucimi
 te pro la disiĝo el la mondo, sed predikante la evan
 gelion en la mondo. Kaj ĉiuj kristanoj, al kiu ajn kon
 diĉo ili apartenas, geedzoj kaj filoj, fratoj kaj amikoj,
 kamaradoj kaj malamikoj. Ĉiu el ni partoprenante en
 la eklezio, enkarniĝinte en la mondo, devas komuni ki
 al la aliaj sian internan vivon. La sango, cirkulante
 en nia korpo, konservas ĝin en la vivo. Kaj tion ni do
 nas kiam ni atestas la kredon en Kristo, kaj por ĉi tiu
 kredo ni oferas nin mem en la devo, en la preĝo, ĝis
 per la elverŝo de nia korpa sango, se Dio tion petus
 de ni..."

PRI LA VIZITO DE KARDINALO ALFRINK al la pa
 po, kiu daŭris pli ol unu horo, la 21-an de januaro, ne
 estis donitaj oficialaj komunikoj kaj oni ne konas la
 diskutitajn argumentojn. Tamen oni povas konjekti, ke
 la ĉefaj problemoj estis tri: 1-e: la orientiĝo de la ne
 derlanda episkoparo pri la sacerdota statuto, kaj a-

parte pri la celibato de la klerikoj; 2-e: la pli kaj pli malfacila kontrolo de kritika katolikismo interne de la nederlanda eklezio; 3-e: la sekvoj de la elekto de la nova episkopo de Roterdamo, kiu trovis gravan opozicion en Nederlando. Gis nun la prudento de kard. Alfrinks sukcesis malhelpi pli gravajn rompojn. Eĉ oni povas diri: ke la inkludo de la celibata problemo en la tagordo de la proksima episkopa sinodo estis konsekvenco de liaj insistoj. Pri la afero de la episkopo Simonis, la nederlanda episkoparo, post la unuaj opozicioj, klinis la kapon antaŭ la papa decido. Sed ekzistas danĝero, ke la nederlanda episkoparo sin trovu pli kaj pli disigita de sia popolo, en la tensio inter Utrecht kaj Romo.

LA RILATOJ INTER LA Katolika eklezio kaj COE (Tutmonda Konsilantaro de la Eklezioj) estis indikitaj de la papo en la parolado, kiun li faris en Ĝenevo, la 10-an de junio 1969-a. La papo en tiu okazo, parolante pri la diversaj komunaj kampoj de la du organizoj malsimilaj inter si, agnoskis, "kun frata sincereco, ke la problemo de la partopreno de la Katolika Eklezio al COE ne estas tiel matura, ke oni povas aŭ devas doni pozitivan respondon. La problemo restas en la kampo de hipotezoj. Oni devas ankoraŭ pristudi profunde la multajn implikitaĵojn teologiajn kaj paŝtistajn, Kaj oni devas konfesi, ke tio povas postuli ankaŭ longan kaj malfacilan iradon. Unue oni devas ricevi konsenton de la membroj de COE al akcepto en la Konsilantaro (ĉar ne ĉiuj el ili estas favoraj al tio, ankaŭ pro la ekvilibro, kiun la katolika eklezio povus profunde ŝanĝi per sia ĉeesto); kaj poste, la katolika eklezio devas mem decidi pri tiu oportuneco aŭ ne. Oni devas klare vidi inter la multaj ĝiaj agadoj kian lokon havas la celo de la videbla unueco de ĉiuj kristanoj al ununura eklezio; ki

an influon COE havas al la ĝenerala orientigo, al la pensmaniero, al la programoj de la eklezioj-membroj. Kaj aliflanke, kia estas la reala parto, kiun ĉi tiuj havas en la plej gravaj decidoj de COE. Kian influon povas doni tiu aparteno por la interna krizo, kiun aflikta la plej grandan parton de la kristanaj eklezioj? Laŭ mezuro ĉi tiu problemo konkrete rilatas la katolikojn ĉe nacia kaj loka nivelo? Tiuj gravaj problemoj postulas komunajn spertojn, kiujn oni ne lernas de unu tago al la alia. Kunlaboro esprimas jam ian unuecon kaj favoras ĝian perfektigon. Sed oni devas priserĉi la plejfaŭgajn kunlaborajn formojn, kiuj permesu plene respekti la identecon de la katolika eklezio kaj ebligu plej efike ĝian servon al unueco de ĉiuj kristanoj. En la aktuala stato ŝajnas do, ke pli ol eniro en COE-n, oni devas paroli pri kunlaborado.

450.000 ESTAS LA NOMBRO DE la katolikaj sacerdotoj en la tuta mondo (280.000 diocezoj kaj 170.000 religiaj). Prof. Francisko Houtart, de la Lovana universitato pristudis la hemoragian problemon en la vivoj de la klerikaro, kaj alvenis al konkludo, ke tiuj, kiuj forlasis la pastran staton estis inter 22.000 kaj 25.000, iom pli ol 5 procento de la tutmonda klerikaro. La plej nombraj estas inter la 30 kaj 45-jaraj sacerdotoj, kiuj estas ĉirkaŭ 200.000. En ĉi tiu klaso la plej oftaj forlasoj atingas la 10 procenton. Pri la ordinoj, Nickalkulis, de ili malpliigis de la 20 ĝis la 50 procento, laŭ la regionoj. El ĉi tio reliefigas la graveco de la unua artikolo fiksita por la sinodo de la venonta oktobro, laŭ peto de kard. Marty: "La pastra ministerio", pri kio la Papo deklaris, ke ĝi devas havi la unuan rangon.

PREPARE AL LA "Tago por la Paco" (1-an de Janu-

aro) Mons. Bettazzi faris gravan paroladon ĉe la Misi-ista Centro P. I. M. E. en Milano pri temo: "Ĉu paco estas utopio?" Sed ĉar kelkaj el liaj opinioj kaj konkludoj ne ŝajnas al ni pravigeblaj, ni citas liajn vortojn por regustigi laŭ nia vidmaniero la respondon al la tema de mando. Parolante pri rilatoj de religio kun milito, interalie li diris: "Mi opinias, ke en la pasinteco, kiam ne estis eble sin direkti al altaj arbitracioj, la milito aperis iom kiel sinturno al dia juĝo. Ĉar oni estis konvinkita, ke Dio disvolvas la historion, oni pensis, ke Dio ebligas la pli justan parton certe venki. Fakte en ĉi tio konsistis longtempe la rilatoj inter milito kaj religio; nur poste, kiam okazis militoj inter samreligianoj kiuj ankaŭ havis komunan superan gvidanton, la papon, oni devis priserĉi novan teorion, nome teorion de la justa milito, laŭ la juĝo de la religia aŭtoritato. Kelkfoje ne estas facile prijuĝi justecon aŭ maljustecon de iu milito, ĝuste pro tio, ĉi diris mons. Bettazzi, ke la Eklezio aperas ankoraŭ en la mondo, kiel potenco, kvankam spirita, lan embarason en pritaksado de milito, ŝi daŭrigas: oni renkontas ankaŭ en la koncilaj dokumentoj, en "Gaudium et Spes". Multaj koncilaj episkopoj preferus tiam, ke milito estu malkaŝe kondamnita, kiel kontraŭkristana; sed oni ne alvenis ĝis tie; kaj oni deklaris, ke ekzistas cirkonstancoj, en kiuj oni ne povas malagnoski al iu popolo defendorajton; en la loko de justa milito oni rekonas defendan militon, tamen kun rezervo, nome ke oni vane esploris ĉiujn aliaj vojojn, kaj ankaŭ ke oni ne devas altrudi danĝerojn pli grandajn, ol tiujn, kiujn oni devis timi: resume, la milito devas esti proporcia al la defendendaj rajtoj. Laŭ la kristana vidpunkto, do, tute ne estas pravigebla atommilito. Ĉi okaze mi demandas ĉu kristano ne devus protesti en ĉi ĝie kontraŭ tiujn, kiuj pretigas atomarmilojn kaj ĉu li ne

devus rifuzi partopreni en iliaj pretigoj." Ni volis ci ti ĉi tiujn vortojn, por esprimi nian malkonsenton pri la ne ĝusta konkludo, devenanta de ne ĝustaj premisoj. Mons. Bettazzi estas verŝajne pli anĝelo ol homo; sed la eklezio, estas farita el homoj, kaj oni devas prijuĝi konkrete, ne abstrakte la homajn aferojn. Pro tio ni diras, ke se el unu flanko oni pretigas militon kaj atombombojn, estas necese, estas devo ke ankaŭ el la alia flanko oni faru la samon, kvankam kun ĉagreno, supoze ke intertraktadoj por peti detruon de tiuj armiloj aŭ haltigon de ilia konstruado estis vana. Nur tiel oni ebligas ian ekvilibron, kiun oni povas diri preskaŭ pacon; neperfektan, ja, tamen tian, ke almenaŭ kapablas bari militon. Post la dua tutmonda milito kiomfoje ne estus sekvinta la tria, se ne estus pretigita ĉi tiu ekvilibro? Jen do nia respondo al la argumento: "Ĉu paco estas utopio?" Ni dirus: perfekta paco, jes. Sed neperfekta paco tute ne estas utopio, kaj ni devas klopodi por pli kaj pli perfektigi ĝin. Sed kion ni devas pensi pri la paco, kiun Kristo donis al ni? Li unue donis al ni pacon kun Dio. Nur ĉi tiu povas efektive esti perfekta. Sed interhoma pacodependas de mezuro de amo, kiun li ordonis al ni, sed kiu, bedaŭrinde, ne estas same akceptita de ĉiuj. Tiel ankaŭ la Koncilo montriĝis inspirita kaj prudenta en sia pleneco, kaj reĝustigis la anĝelajn revojn de kelkaj episkopoj.

DELEGACIO DE L'LEJALTA KONSILIO por la Islamaj Aferoj el Kairo estis gastita en Romo de la Sekretariato por la ne-kristanoj dum la lastpasinta decembro. Unu el ĝiaj membroj, D.ro Salah Sabry, skribis sur "L'Osservatore Romano" longan artikolon pri dialogo inter kristanoj kaj musulmanoj. "Ĉi tiujdu religioj, skribis Sabry, kunlaboris por meti bazojn de

la homa civilizo en la materiaj kaj en la spiritaj aferoj kaj kondukas al unueco de la kreinto, tio estas, al monoteismo. Alproksimiĝo de iliaj kredantoj estas necesa ankaŭ en Eŭropo: en Francujo, ekzemple, vivas ĉirkaŭ unu miliono da musulmanoj". Dum la multaj kunsidoj organizitaj de la sekretariato por la ne-kristanoj, kun ĉeesto de reprezentantoj de diversaj organizoj de la roma kurio, oni pritraktis: la religian formigon de junuloj; problemojn de junaj laboristoj en la tria mondo; familion; sekularigon; la ne-kredantojn; religian libereecon, ktp. Kaj neniam la diskutoj glitis el la religia al la politika tereno.

LA FRANCA PROTESTANTA PORINFORMA centro kaj la katolika tutnacia informa sekretariato decidis publiki kune informan bultenon por ĉiuj francaj kristanoj. La bulteno stencilita havos tri partojn: la unua titoliĝos: Protestanta servo por informo kaj preso"; la dua: "Katolika servo por informo kaj preso"; la tria parto enhavos la komunikojn verkitajn kune de la du organizoj. La sciigo estis donita okaze de gazetara informado, en kiu ĉeestis, ennome de kard. Marty, mons. Ekhegaray kaj la prezidanto de la protestanta federacio de Francujo.

MONS. JEREMIE, ORTODOKSA greka helpepiskopo de metropolito Meledios, reprezentante en Francujo patriarkon Atenagoron de Konstantinopolo, estis konse-krita en Parizo la 1-an de februaro. Al la ceremonio partoprenis interalie la prezidanto de la protestanta federacio de Francujo kaj la katolika mons. Pezerli, helpepiskopo de Parizo, reprezentanto de kard. Marty. Je la fino de la ceremonio, kiu disvolviĝis kun la soleno de la greka liturgio, la metropolito prezentis la novan ĉefepiskopon al la asembleo, kiu kantis: Aksios, Ak

sios (t.e.: li estas inda). Partoprenis multaj respresentantoj de la ortodoksa eklezio de multaj eŭropaj ŝtatoj, precipe de Grekujo.

LA ASEMBLEO DE LA "Internacia Kunlaboro por la Socia-Ekonomia Evoluo" (CIDSE) okazis komence de decembro en la Kongresa Palaco de Bruselo sub prezidanteco de kard. Suenens. La CIDSE kunligas ĉiujn movadojn kontraŭ malsato, kreitaj de la Episkopaj Konferencoj (Catholic Aid for Overseas Development, de Britujo; Misereor (Germanujo); Aŭstralian Catholic Relief (Aŭstralio); Koordinierungsstelle fuer Entwicklungshilfe (Aŭstrujo); Entraide et Fraternité - Broederlijk Delen (Belgujo); Organisation Catholique Canadienne pour le Developpement et la Paix (Kanado); Comité Catholique contre la Faim et pour le Développement (Francujo); Bisschoppelijke Vastenactie (Nederlando); Fastenopfer der Schweizer Katholiken (Svisujo); Catholic Relief Services (Usono); Italujo, kie ankoraŭ ne estas organizita la asocio decidita de la episkopa sinodo, estis reprezentita per la asocio "E-tenditaj Manoj"). La CIDSE, kies ĉefa organizinto estis kard. Frings, ĉefep. de Kolonio) hodiaŭ reprezentas fonduson de 40-50 milionoj da dolaroj poĵare, por la ekonomia evoluo de la tria mondo, Celo de CIDSE estas ne grandaj entreprenoj sed malgrandaj, maksimume inter 10-20 mil dolaroj), kaj pro tio unue por la popola kulturo, kooperativoj, sindikatoj, ktp.) Kaj ne kiel donaco, sed helpo. Ĉio devas esti repagita, tiel ke la helpitoj povu siaflanke fariĝi helpantoj de aliaj. Nur tiel oni povas stimuli agemon kaj progreson. La CIDSE estas malfermita ankaŭ al ne katolikaj eklezioj: kard. Suenens diris, okaze de ĉi tiu invito al la Tutmonda Koncilantaro de la Eklezioj kaj al la Lutera

Tutmonda Federacio: "Ĉi tio estas la plej taŭga bazo por rekonstrui la unuecon de la kristanaro".

MONS. SERGIO MENDEZ ARCEO, episkopo de Cuernavaca, en Meksikio, petis de la registaro la revizion de la konstituciaj artikoloj, kiuj pritraktas la rilatojn inter Eklezio kaj Ŝtato. Laŭ la opinio de la meksikia juristo tiuj leĝoj havas sektecan spiriton. Fakte la artik.130 rajtigas la Ŝtaton interveni pri kultaj kaj religiaj aferoj en ĉiu ajn cirkonstanco. Nenia laŭjura personeco estas agnoskita al la eklezio; la nombro de la klerikoj (kiuj interalie estas senigitaj de aktivaj pasiva voĉo), estas determinita de la lokaj aŭtoritatoj. Al la ministro pri internaj aferoj apartenas permesi aŭ male novajn templojn; ĉiu publika kultagado estas kontrolita de la aŭtoritatoj kaj ne povas efektiviĝi ekster preĝejoj. Kaj tio en lando kie fideluloj estas la 96,5 % de la loĝantaro.

KVANKAM LA SITUACIO DE la eklezio en Kubo, komunista respubliko, estas ankoraŭ tre delikata kaj malfacila, tamen ĝi iom post iom pli klariĝis. Pri kelkaj aspektoj devenantaj de la absoluta disiĝo inter eklezio kaj ŝtato, oni povas eĉ diri, ke ĝi estas privilegiita: la episkopoj, ekzemple, estas elektitaj sen la registara aprobo, kaj sacerdotoj povas esti destinitaj kien ajn. Ne ekzistas katolikaj revuoj, nur malgrandaj bultenoj, sed sen cenzuro. La episkopoj povas vojaĝi eksteren; ankaŭ simplaj sacerdotoj povus tion fari, se ili ne estus tre malriĉaj. Ĉi tiuj, kiuj antaŭ la revolucio estis 723 nun estas nur 228 por ĉirkaŭ 8 milionoj da kubaĵoj, el kiuj almenaŭ ses milionoj baptitaj. Dum la lastaj 10 jaroj okazis nenia nova ordino; pro tio la meza aĝo, de la nunaj sacerdotoj iom estas alta. Oni atendas baldaŭ de la teologia seminario ses aŭ sep novajn

pastrojn ĉiujare; sed ili estos ankoraŭ ne sufiĉaj. Religiulin^oj, kiuj iam estis 2.225 nun estas nur 198. Tamen la kristana vivo estas multe pli serioza kaj konscia ol antaŭe inter la fidelularo, kiu konservis sian kredon.

LA NOMBRO DE PASTROJ en Bolivio, la 31-an de julio 1968, estis 913: (197 bolivianoj kaj 716 eksterlandanoj). Unu pastro por 4881 loĝantoj, dissemitaj en teritorio vasta pli ol 12 foje Italujo kun denseco egala al 3,5 por k.kilometro. Oni konstatas daŭran malpliigon de la bolivia dioceza pastraro, ne kompensita de la malgranda nombro de religiuloj. Se tiu ritmo de malpliigo daŭrus konstante, oni kalkulas, ke en la 1990-a ne plu ekzistus tie landaj pastroj. En enketo farita de loka ĵurnalo, la 52,91 % de la sacerdotoj parolas favore al celibato, kiel privilegio de individuo, kiu povas entute sin doni. Sed kelkaj opinias, ke tio povas efektiviĝi nur en komuneca medio. Propono ordini edziĝintajn laikulojn estas por la plejmulto inda de serioza pristudo (46,60 %) eĉ (40,05 %) unu el la plej necesaj iniciatoj por Bolivio. Intertempe oni konsentas, ke oni pliigu la nombron de edziĝintaj diakonoj.

LA REGISTARO DE SABAH (Borneo), kiu apartenas al Malajzio decidis forsendi laŭgrade ĉiujn eksterlandajn misiistojn, ne renovigante al ili la restadpermeson, kiel al nedezirindaj gastoj. De kelka tempo oni antaŭvidis tiun ordonon, ĉar la ĉefministro Haji Moustaphà, fondinto de la Islama Sabah-Asocio, ne kaŝis ekde la komenco siajn intencojn. Multaj sacerdotoj kaj fratinoj jam devis forlasi la ŝtaton; la aliaj atendas la lastan datlimon, kiu estos la 1973-a. La lokaj sacerdotoj estas nur 12 kun 35 seminarianoj. Tamen ili estas helpataj de 1.900 katekumenoj kaj la katoli-

koj estas tre agemaj. Oni esperas en la ordino de la laikaj diakonoj. Ĝis nun tamen oni konfirmis, flanke de la registaro, ke tio ne signifas persekutadon de la religio kaj ke oni ne pensas konfiski la havaĵojn de la kristanoj.

LA ĈIJARA ASEMBLEO de COE okazis en Addis Abeba kun la ĉeesto de imperatoro Hailé Selassié, kiu en la enkonduka parolado diris: "Ĝis kiam ni, kiuj estas disĉipuloj de Kristo, kiuj sekvas la instruojn de la sama S. Biblio, daŭrigos niajn disiĝojn? Ni kristanoj ne povas seniĝi de nia respondo pri la tutmonda pacagado kaj pri egaleco de ĉiuj antaŭ Dio". La imperiestro gratulis COE-n pro la sinteno, kiun ĝi decidis favore al la subevoluintaj landoj, kaj aldonis, ke ĉiu asistofomo devas esti libera de ĉiu ajn "politika infekto". Partoprenis delegitoj de 230 eklezioj ortodoksaj kaj protestantaj. La katolika eklezio ĉeestis pere de "observantoj". Viglaj debatoj ne mankis pro la diverseco de principoj. Mons. Georges Khodre, metropolito de la greka eklezio de Antiokio asertis, ke la S. Spirito ne estas ligita al institucia eklezio, ke teologoj, kiuj dogmadas sen priatento al la aliaj eklezioj ne parolas laŭ la dia vero; ke oni devas priserĉi kaj respekti la aspektojn aŭtentike religiajn ankaŭ de la ne baptitoj. Al li respondis polemike la honora prezidanto de COE, Viser't Hooft, ke se la apostolo Paŭlo estus havinta la samajn opiniojn pri la aliaj religioj, kiujn havas metropolito Khodre, ne estus predikinta Kriston al la atenanoj, sed preferu li estus nur klopodinta reformi ilian religion elinterne. Sed la plej vigle debatoj estis ĉirkaŭ la decido de COE helpi per financaj rimedoj la porliberajn movadojn de la subevoluintaj popoloj. Ĉu la eklezio povas kuraĝigi geriliadojn? La evangelio estas kontraŭ perforto. La eklezioj certe ne intencas ĉi tion, sed ili vo

las veki la mondan konsciencon pri la kontraŭevangelia kaj kontraŭhoma rasismo, ankoraŭ reganta en multaj lokoj.

LA KATOLIKA EKLEZIO de la Dem.Resp.Kongo estas laŭnombre la plej granda en la tuta Afriko. Laŭ freŝaj statistikoj ĝi havus 20 milionojn da loĝantoj, el kiuj la 40 % sin deklaris katolikoj. La evangelizado de la lando komencis nur ĉe la fino de la ĵus pasinta jarcento. La ses ekleziaj provincoj entenas ses ĉefdiocезojn (Kinshasa, Mbandaka, Kisangani, Bukavu, Lubumbashi, Luluaburg) kaj 40 diocезojn. 27 episkopoj estas indiĝenaj. Troviĝas en tiu lando 8.304 inter sacerdotoj, religiuloj kaj fratinoj. t.e.: 587 diocезaj kongaj pastroj, kaj 70 fremdaj; 2774 eksterlandaj misiistoj, 394 fratoj indiĝenaj kaj 286 fremdaj, 1.115 fratinoj indiĝenaj, 3078 eksterlandaj. Ekzistas 42 fremdaj institutoj de misiistaj sacerdotoj, kaj 8 de fratoj; 13 kongaj kongregacioj de fratoj, 109 virinaj eksterlandanaj kaj 22 indiĝenaj. La preparo de la 352 pli aĝaj seminarianoj estas zorgita en la "pli grandaj 6 seminarioj". La kontribuo de la eklezio en la kultura sekcio estas: 6.197 unuagrada lernejoj kun 1.557.389 lernantoj; duagrada, kun 8.804, kio estas pli ol 50% de ĉiuj lernejoj de la tuta lando. 10 superaj Institutoj kaj 1 katolika Universitato, kun 3.300 studentoj. 243 estas en la porsaniga sekcio la hospitaloj, krom la flegado ĉe 135 ŝtataj hospitaloj fare de religiulinoj. La misioj suferis multe kiam en la Okcidenta Kongo oni naciigis ĉiujn lernejon, konfiskante ĉiujn ekleziajn konstruaĵojn kaj malrajtigante la Katolikan Agadasocion. Tamen iom post iom la misia movado sukcesis adaptiĝi, en la spirito de la Koncilo, al la cirkonstancoj, dank' al la multenombra kaj vigla laika fidelularo. Preskaŭ

en ĉiuj vilaĝoj viglas grupoj de plenaĝuloj por pristudi la liturgian adaptiĝon, komponi religiajn afrikstilajn muzikojn, organizi novajn religiajn movadojn: la Maria leĝiono, kunfrataroj, antaŭseminarioj, parokaj organizoj.

AMASA TRANSLOKIGO de negruloj en Rodezio estis decidita la 23-an de decembro 1969 de la tiea rasisma blanka registaro. 13.000 negruloj devis cedi al la blankuloj sian plej fruktoriĉan teritorion, kie ili helpe de la misiistoj sukcesis dum multjara laboro kanaligi torrentojn, konstrui digojn, klinikojn, sep grandajn lernejojn. Tiu nekredinda maljustaĵo estis ebla pro la leĝo de urĝa krizostato, kiun la registaro kapablis daŭrigi ekde la 1955-a! Tiuj, kiuj posedas bestaron ne estas rajtigitaj kunporti ĉion kun si, sed ili devas vendi la plej grandan parton laŭ la prezoj fiksitaj de la blankuloj. La konstruaĵoj starigitaj kun tiom da oferoj de P. Paŭlo Egli, la svisa negrulmisiisto, devos esti forlasitaj sen iu ajn kompenso, kaj estos malpermesita al li ekde nun sin okupi pri lernejo kaj eĉ pri klubo por la junularo. La misiisto ricevis ja hektaron da tereno por la konstruota preĝejo, sed provizore ankaŭ li devos loĝi sub tendo.

EN LIMURU, apud Nairobi en Kenjo oni havis, de la 1-a ĝis la 4-a de decembro studseminarion pri "Eklezio kaj Progreso", en kiu partoprenis 34 delegacioj de la katolika eklezio kaj de registaroj de Kenjo, Ugando kaj Malavio. En multaj ŝtatoj de Afriko eklezioj kaj registaroj kunlaboras pli kaj pli kuniĝe por la progreso de siaj landoj.

LA RELIGIA KONGREGACIO de la Blankaj Patroj decidis akcepti en sian instituton needziĝintajn virojn, kiuj intencas labori sub ĝia direkto kiel laikaj misiistoj

en Afriko dum la tuta tempo de sia misia agado. Revenante en sian patrujon ili estos helpataj de la samainstituto reenigi en la malnovan medion.

PLENA ASEMBLEO DE la malagasa episkoparo ĵus okazis en ĉefurbo Tananarivo. El la 17 diocezoj, kiujn la katolika eklezio havas en la granda insulo disigita de la Afrika kontinento per la Mozambika markolo, 5 apartenas al malagasaj episkopoj. Prezidanto de la episkopa konferenco estis elektita la ĉefepiskopo de Diego Suarez, mons. Alberto Tsiakoana. La ĉefa temo pritraktita estis: "La sacerdota kaj religia vokiĝo en Malagaso". Tiurilate oni rimarkas, ke se la proporcio de la malagasaj religiulaj fratoj estas la 60-a procento de ĉiuj sacerdotoj de la lando, (kaj respektive la fratinoj 44 procento de ĉiuj fratinoj), tiu de la aŭtoktonaj sacerdotoj estas nur la 25 procento.

EL ENKETO ENKONDUKITA DE UNESCO rezultas, ke la rekordo de la tradukoj en la mondo apartenas al Biblio, kun 1875 tradukoj. Sekvas: la verkoj de Lenin: 1225, el kiuj 131 en la diversaj lingvoj de Rusujo; Ŝekspiro: 135; Verne: 133; Gorki: 125; Markso: 112; Tolstoj: 112; Dostojevski: 101; Engels: 94; Dickens: 70; Maupassant: 46; Balzac: 44; Goethe: 41; Che Guevara: 40; Marcuse: 20; Stendal: 18. Ni memorigas, ke le religia esperanta libreto "Vojo" ĉe ni akirebla, pri kio ni menciis en la januara numero, pag. 10, atingis la nombron de tradukoj en 27 lingvojn, kaj baldaŭ la nombro altiĝos al 41.

ĈIRKAŬ 140 ESTAS hodiaŭ en la mondo la diakonoj konsekritaj por stabila funkciado en la servo al la religio. Ĉi tiu nombro certe rapide plialtiĝos, ĉar tiuj

kiuj sin pretigas por ĉi tiu sankta celo estas multaj centoj. La lando, kie ili nun estas pli multenombraj, estas Germanujo (preskaŭ 70, tio estas la duono de la ordi - nitoj en la tuta mondo); kaj samtempe tie sin preparas pli ol 500 kandidatoj. En la aktuala momento hodiaŭ en Belgujo estas iom malpli ol 30 diakonoj, kaj malpli ol 10 en Francujo. Sed oni estas informitaj, ekzemple, ke en Usono kaj en la Latina Ameriko estis enkondukitaj kur - soj, ankaŭ vesperaj, por prepari kandidatojn. Estas sciata, ke ankaŭ la italaj episkopoj aprobis la diakonan rangon kiel stabilan oficon, kaj por junuloj, kiuj sin de - vigas al celibato, kaj por geedziĝintaj maturaĝaj per - sonoj. Ankaŭ la franca episkoparo - skribas la 2-an de februaro "Le Figaro" starigis serioze la problemon: pre - fere ol simplaj liturgiaj animantoj, oni volas diako - nojn, kiuj zorgu ĉefe por misiaj celoj kaj por servo al homoj.

LA KATOLIKAJ SACERDOTOJ POVAS disdoni la komu - nion, transdonante la konsekritan hostion en la manojn de la komunianto, anstataŭ en la buŝon, en la 10 landoj de la mondo. Tion deklaris dum la kutima semajna ga - zetarkomuniko, la vatikana proparolanto prof. Ales - sandrini, kiu ankaŭ informis, ke la dek episkopaj kon - ferencoj latinritaj, kiuj ricevis de la Sankta Seĝo ti - un rajton, kun la limiĝoj kaj kondiĉoj antaŭviditaj en la instrukcioj de majo de la '69-a, donitaj de la Kongrega - cio por la dia kulto, estas la konferencoj de la Suda Afriko, Aŭstrujo, Belgujo, Kanado, Francujo, Japan - ujo, Germanujo, Jugoslavio, Nederlando kaj Ĝibutio. La permeso disdoni rekte la komunion en la manojn de la komuniantoj, rezervita al la Sankta Seĝo, estis antaŭvi - dita de papa dokumento, eldonita post la 2^a Vatikana Koncilo.

P. MARCELO DELISLE en la diocezo de Kabba en Niĝerio, kiu direktis la konstruon de hospitalo ĉe Isanlu, ricevis oficiale la insignojn de estro de la Yoru-boj. "Hodiaŭ - oni proklamis en la kunveno - vi estas vestita kiel estro, ĉar ni rigardas vin kiel unu el ni. Kvankam vi venis el Kanado, vi fariĝis niĝeriano kiel ni, kaj frato al ĉiu el ni, senrigarde de religio, aĝo aŭ socia rango". Inter la ĉeestantaj estroj kunvenintaj, estis rimarkite, ke nur la elektito estis kristano.

ONI MULTĖ PAROLAS PRI LA TRIA MONDO; sed oni povus aserti, ke la tria mondo estas reprezentita ankaŭ ĉe ni: en Italujo estas 30,000 la eksterlandaj studentoj, dissemataj inter multaj universitatoj, profesiaj institutoj kaj industrioj por akiri praktikon. Estas granda malfacilaĵo atingi ĉiujn por efika helpiniĉiatio. Tamen ne mankas diversaj privataj entreprenoj, precipe UCSEI (Ufficio Centrale Studenti Esteri in Italia), kiu la pasintan jaron sukcesis doni pli ol 25 milionoj por helpo al afrikaj, sudamerikaj kaj aziaj gestudentoj, ĉar, kontraŭ la ĝenerala opinio, nur tre malmultaj el ili ĝuas pri stipendoj. En ĉi tiu organizo la asisto estas konfidita al profesiuloj, dum la religia kampo estas zorgita de ekleziuloj. Ekzistas ankaŭ speciala monata revuo por ili, "Amicizia", jam de sep jaroj, redaktita de la studentoj mem.

.....

ABONO AL NIA BULTENO UECI-CECR £ 1000(=\$ 1,60)

Oni sendu al:

postgirkonto 3-7791: D.ro C.C.Ferrari; Viale dei Mil
le 37; 20129 Milano; aŭ al: pĝk. 1-37638. P. Giacinto
Jacobitti; piazza S. Maria Maggiore 8; OO185 Romo.

.....